

Elektitaj Poemoj de Hanshan

elĉinigis Vejdo

eLibrigita de Elerno

nov. 2013



唐寒山大士

Hanshan (cîrkaŭ 691-793)

1.

Legantoj de poemoj miaj
prizorgu vin kun pura kor',
reduktu vian avidemon,
korektu flaton kun fervor'
forigu la malvirtojn de vi,
vin tenu al vera humor'.
Nun vi ekhavas budhan korpon
Rapide agu de ĉi hor'.

凡读我诗者，心中须护净。慳贪继日廉，谄曲登时正。
驱遣除恶业，归依受真性。今日得佛身，急急如律令。

2.

Loĝejon fiksita mi sub rok'
kun bird-flugad' sen vojo homa.
nubaro blanka volvas ŝtonojn
en la kvieta korto doma.
Dum jaroj tie ĉi mi ĝuas
ripeton de ŝanĝad' sezona.
Admonon al la bonhavuloj:

ja malutilas vant' renoma.

重岩我卜居，鸟道绝人迹。庭际何所有，白云抱幽石。
住兹凡几年，屡见春冬易。寄语钟鼎家，虚名定无益。

3.

Sur la voj' de l' Frosta Monto

troviĝas ne ĉevalĉara spur'.

Kunflu' de rojoj miskondukas,

montvicoj ja sennombras nur.

Mil herboj ploras jen kun rosoj,

suspiras pinoj sen plezur'.

Ĉe voj-perdiĝo Formo ĉuas

al Ombro kien ties kur'.

可笑寒山道，而无车马踪。联谿难记曲，叠嶂不知重。
泣露千般草，吟风一样松。此时迷径处，形问影何从。

4.

Mi vivas kiel mont-ermito

kun la loĝej' for de hom-bru'.

Tretitaj herboj formas vojojn

najbaras blank-nuboj en flu'.

Bird-ĉirpo paras mian kanton,

ne ĉuas hom' pri Budh-instru'.

Nuntempa bodhi-arb' postlonge

printempon ornamos kun ĝu'.

吾家好隐沦，居处绝嚣尘。践草成三径，瞻云作四邻。

助歌声有鸟，问法语无人。今日娑婆树，几年为一春。

5.

Liut' kaj libroj por ermito,

riĉec' kaj rang' ja sen utilo.

Edzinon sindoneman sekvu ,

en ĉaro rajdu bona filo.

Konfuzas vent' tritikdraŝejon,

fîŝejo ŝaŭmas sen trankvilo.

Memoru troglotidon ofte,

ĝi nestas sur solbranĉ' kun trilo.

琴书须自随，禄位用何为。投辇从贤妇，巾车有孝儿。

风吹曝麦地，水溢沃鱼池。常念鹪鹩鸟，安身在一枝。

6.

Legendas fratoj el kvin lokoj,
kaj patr' kaj filoj en domfond'
kiel fidelaj du naĝbirdoj
blanka lepor' en vagabond'.
Melonon kaj oranĝon feajn
ricevis ja vi en songmond'.
Jen malproksime de hejntero
vi naĝas kun fiŝar' en ond'.

弟兄同五郡，父子本三州。欲验飞鳧集，须征白兔游。
灵瓜梦里受，神橘座中收。乡国何迢递，同鱼寄水流。

7.

Lertulo de penik' kaj spado
renkontis saĝajn mastrojn tri.
Nek lia pens' bonvenas tie
nek lia skermo tie ĉi.
Li majstras en penik' kaj spado
kaj amas ambaŭ kun pasi'.
Nun li jam estas maljunulo,

ne gravas lasta temp' de li.

一为书剑客，二遇圣明君。东守文不赏，西征武不勋。
学文兼学武，学武兼学文。今日既老矣，馀生不足云。

8.

Pri morto Zhuangzi* kiel ĉerkon

volis ĉielon kaj terplaton.

Mi certe mortos iutage,

bezonos mi nur unu maton.

Per korp' mi bredos muŝojn, ĝenos

ne gruojn sendi min al Fato.

Vivante pure mi preferos

sur Shouyang morti de malsato.

*Zhuangzi (369-286 a.K.) estas fama pensisto kaj filozofo dum la periodo de Militantaj Regnoj.

庄子说送终，天地为棺槨。吾归此有时，唯须一番箔。

死将喂青蝇，吊不劳白鹤。饿著首阳山，生廉死亦乐。

9.

Kiel atingi la Frost-Monton?

Al ĝi la voj' baritas plene.

Somere regas ja glacio,

nebulos densas sun-solene.

Kiel mi loĝas en ĉi monto,

aliaj volas tion ene.

Se iu havas mian senton,

li tie trovas sin senĝene.

人问寒山道，寒山路不通。夏天冰未释，日出雾朦胧。

似我何由届，与君心不同。君心若似我，还得到其中。

10.

Segitis en tabulojn larĝajn

cent-futa arbo sub ĉielo.

Domaĝe tiuj lignopecoj

ĵetitas vale en pelmelo.

Post jaroj ankaŭ ili taŭgas,

defalas nur iliaj ŝeloj.

Sagacemuloj ilin uzas

por teni stalon sen ŝancelo.

天生百尺树，剪作长条木。可惜栋梁材，抛之在幽谷。

年多心尚劲，日久皮渐秃。识者取将来，犹堪柱马屋。

11.

Mi ĉevalrajdis tra urb-ruboj,
nin ĝi tristigas ĝis la kor':
Malnovaj basaj parapetoj,
antikvaj tomboj en horor',
malviglaj ombroj de herbaĉoj,
tomb-arboj klakaj en ventplor'.
La ostoj de mortuloj indas
mencion ne kun fea glor'.

驱马度荒城，荒城动客情。高低旧雉堞，大小古坟茔。
自振孤蓬影，长凝拱木声。所嗟皆俗骨，仙史更无名。

12.

Papagon el okcidentlando,
ĉasist' alportis per kapt-reto.
Tuttage belulino ludas
kun ĝi hareme en kvieto.
En ora kaĝo mallibera
suferas ĝi de plum-demeto.
Malkiel sovaĝa ansero

ŝvebanta alte per flug-ĵeto.

鸚鵡宅西国，虞罗捕得归。美人朝夕弄，出入在庭帟。
賜以金笼貯，肩哉损羽衣。不如鸿与鹤，飄颻入云飞。

13.

Malantaŭ perl-kurten' en halo

troviĝas junulino bela.

Ŝi havas feinan aspekton

kun haŭtkoloro disflor-hela.

Oeste regas brum' printempa,

Ueste aŭtun-vento ŝvela.

Post tridek jaroj ŝi similos

al la maĉita kan' sukera.

玉堂挂珠帘，中有婵娟子。其貌胜神仙，容华若桃李。
东家春雾合，西舍秋风起。更过三十年，还成昔蔗滓。

14.

En urb' fraŭlin' kun belaj brovoj

susuras per pendanta dekor'.

Papagon ŝi amuzas fole

liuton ludas en lunglor’.
Kantvoĉo ŝia eĥas tagojn
ŝi dancas scene kun fervor’.
Ĉu longe daŭros tiu stato?
Ne fridon spitas hibiskflor’.

城中娥眉女，珠珮珂珊珊。鸚鵡花前弄，琵琶月下弹。
长歌三月响，短舞万人看。未必长如此，芙蓉不耐寒。

15.

Gepatroj kleraj ne envias
alion ja krom kamplabor’.
Teksadas pene l’ bofilino,
bakas kukojn ŝia sinjor’.
Vinludas ili per florfrondo,
aŭskultas al bird-ĉirpa ĥor’.
Kiu ja spektas tian scenon?
Nur lign-hakistoj pasas for.

父母续经多，田园不羨他。妇摇机轧轧，儿弄口[口过][口过]。
拍手摧花舞，支颐听鸟歌。谁当来叹赏，樵客屡经过。

16.

Mi loĝas sub rok-klifo verda,

ne volas falĉi herbojn plu.

Rampantoj pendas kaj kroĉvolvas,

ŝtonegoj staras jen sen sku'.

Simioj plukas fruktojn ĝoje,

gruoj kaptas fiŝojn en flu'.

Sub arba ombr' taŭistajn librojn

mi legas kun murmura bru'.

家住绿岩下，庭芜更不芟。新藤垂缭绕，古石竖巉岩。

山果猕猴摘，池鱼白鹭衔。仙书一两卷，树下读喃喃。

17.

Sezonoj alternas senfine,

forpasas jar' post jar' en ŝtel'.

Mil kaj mil estaĵoj ŝanĝiĝas,

neniam oldas la ĉiel'.

Oeste brilas, ne ueste,

repompas floroj post velk-sfer'.

Nur la mortintoj ne revenos

eterne el obskura ter’.

四时无止息，年去又年来。万物有代谢，九天无朽摧。
东明又西暗，花落复花开。唯有黄泉客，冥冥去不回。

18.

Ĉagren’ seniĝis ĉe jarturno,
printemp’ freŝigas mondon bele.

Montfloroj ridas al akv-fluo,
nebul’ el valo soras ŝvele.

Abeloj, papilioj flirtas,
fiŝoj, birdoj ludas libere..

Kompanoj kaj mi post ekskurso
maldormas nokte ekscit-pele.

岁去换愁年，春来物色鲜。山花笑绿水，岩岫舞青烟。
蜂蝶白云乐，禽鱼更可怜。朋游情未已，彻晓不能眠。

19.

La homo prodigema famas
pro aspekto kun korp’ fortika,

La vivo tamen limigita,

post mort' li pluos ne pensiga.

De antikveco restas tia,

neniu eskapas efika.

En nubojn venu al mi,

ni kantu jen per ton' muzika.

手笔太纵横，身材极瑰玮。生为有限身，死作无名鬼。

自古如此多，君今争奈何。可来白云里，教尔紫芝歌。

20.

Por trovi rifuĝejon pacan

la Frosta Monto taŭgas bone.

Zefiro blovas pinojn softa,

muzikas arboj jen belsone.

Subarbe grizharul' la tekstojn

taŭistajn legas murmurtone.

Sen hejmeniri por dek jaroj

ne l' vojon konas li persone.

欲得安身处，寒山可长保。微风吹幽松，近听声逾好。

下有斑白人，喃喃读黄老。十年归不得，忘却来时道。

21.

Junulo bela surĉevale

klakadas vipon al saliko.

Li morton neniam imagas

nenion faras kun efiko.

Floraro pompas nur portempe,

velkiĝo venos sen indiko.

Mielon kaj kremaĵon li ne

ĝismorte ĝuos el kaliko.

俊杰马上郎，挥鞭指绿杨。谓言无死日，终不作梯航。

四运花自好，一朝成萎黄。醍醐与石蜜，至死不能尝。

22.

Taŭismon praktikante homo

rifuzas venon de laiko.

Ĉe lia domo regas frisko

aŭtuna malgraŭ sunardigo.

En valo fluas glugle rojo,

tra pinoj siblas ventmuziko.

Sidiĝ' dumtaga tie tiras

vin de centjara ĉagren-piko.

有一餐霞子，其居讳俗游。论时实萧爽，在夏亦如秋。
幽涧常沥沥，高松风飏飏。其中半日坐，忘却百年愁。

23.

En Handan* kiel kantistino

mi kantas bele per ari'.

Mi alkroĉiĝas al ĉi loko

longe pro l' kant' de tradici'.

Ne konas riton ebrulo,

taglumon distras mi sen sci'.

Sur mia lito de haremo

plenas brodaĵoj kun radi'.

*Handan (114°03'~40'E, 36°20'~44'N) estas urbo de Hebei-provinco de Ĉinio.

妾在邯郸住，歌声亦抑扬。赖我安居处，此曲旧来长。
既醉莫言归，留连日未央。儿家寝宿处，绣被满银床。

24.

Uzantoj de velŝip' trimasta

rajdantoj de rapid-ĉevalo

Loĝejon mian ne vizitos
kvietan en senhoma valo
Kaŝantan sin en alta monto
ne la dumtaga pluv-vualo.
Ne hom' krom Konfuze'* revivus
povus savi l' mondon el falo.

*Konfuzeo: ĉina filozofo, politikulo kaj edukisto (551-479 a. K.)

快榜三翼舟，善乘千里马。莫能造我家，谓言最幽野。
岩岫深嶂中，云雷竟日下。自非孔丘公，无能相救者。

25.

Saĝul' ne proksimiĝas al mi,
stultulojn mi ignoras same.
Kun la nestultaj kaj nesaĝaj
mi ja ne plu rilatis jame.
Mi nokte kantas al la luno,
matene dancas nub-kompane.
Ĉu nure tiel mi kondukas
ĝis miaj haroj blankos vane?

智者君抛我，愚者我抛君。非愚亦非智，从此断相闻。
入夜歌明月，侵晨舞白云。焉能拱口手，端坐鬓纷纷。

26.

De bambu-ŝosoj vivas alte
surarbe bird' kun bunt-kolor'.

Lantemaj movoj ĝiaj decas,
kaj mildaj kriĉoj plaĉas al kor'.

Hieraŭ venis ĝi, mi scias
ne, kiel flugis ĝi de for'.

Aŭskultante al ĝia kanto,
mi dancas ĝis matena hor'.

有鸟五色彰，栖桐食竹实。徐动合礼仪，和鸣中音律。
昨来何以至，为吾暂时出。恍闻弦歌声，作舞欣今日。

27.

Mi loĝas jen en pajlkabano,
malmultas vizitantoj tie.

Arbaren birdoj emas svarmi,
rojen fiŝoj naĝi socie.

Mi plukas fruktojn kun la filo,
geedzoj plugas kampojn plie.

Mi havas nenion endome

krom libroj en la lito ĉie.

茅栋野人居，门前车马疏。林幽偏聚鸟，溪阔本藏鱼。
山果携儿摘，皋田共妇锄。家中何所有，唯有一床书。

28.

Por suprengrimpi Frostan Monton

vi povas trovi vojojn cent.

Videblas strangaj ŝtonoj en roj-lito

surmonte herboj jen kun tent’.

Glitigas padoj musk-kovritaj,

pinarboj skuas eĉ sen vent’.

Ekstermondanojn mi invitas

en nuboj sisi kun kontent’.

登陟寒山道，寒山路不穷。谿长石磊磊，涧阔草濛濛。
苔滑非关雨，松鸣不假风。谁能超世累，共坐白云中。

29.

Obsedas min malsanoj multe,

paroloj miaj vanas ĉie.

En veproj restas talentuloj

nepova mi endomas fie.

La klifo sub sunlum' malhelas,
svagas senbruma val' varie.

Ne havas decajn vestojn korpe
idoj de loĝantoj ĉi tie.

六极常婴困，九维徒自论。有才遗草泽，无艺闭蓬门。
日上岩犹暗，烟消谷尚昏。其中长者子，个个总无裨。

30.

Super altmontoj nuboj flosas,
ondetas verda lago brile.

Fiŝistoj tie ĵetas reton
kantante laŭte ja jubile.

Ilia ĉant' elvokis triston
en mia koro maltrankvile.

Kiel senkornaj birdoj flugas
tra l' muron mian tre facile?

白云高嵯峨，绿水荡潭波。此处闻渔父，时时鼓棹歌。
声声不可听，令我愁思多。谁谓雀无角，其如穿屋何。

31.

Vojetoj al Frost-Mont' kvietas,

rojborde fridas paca flu'.

Aŭdeblas ĉirpas birdoj trile,

homsignoj mankas ja sen bru'.

Susure vent' karesas vangojn,

sur korpon falas neĝ' kun glu'.

Sunlumon mi ne vidas tage,

mi la printempon konas nek plu.

杳杳寒山道，落落冷涧滨。啾啾常有鸟，寂寂更无人。

磻磻风吹面，纷纷雪积身。朝朝不见日，岁岁不知春。

32.

Pro kio l' junaj ĉagreniĝas?

Pro har-griziĝ' laŭ jar-difino.

Pro kio l' oldaj ĉagreniĝas?

Pro proksimiĝ' de l' viva fino.

En granda aĝo mi transloĝu

al Tajshan-Mont'* kun malinklino.

Kial mi diras ĉi parolon?

Ĝi vundus l' oldajn en deprimio.

*Tajshan-Monto: granda monto en Shandong-provinco de Ĉinio, alta je 1545 metroj.

少年何所愁，愁见鬓毛白。白更何所愁，愁见日逼迫。
移向东岱居，配守北邙宅。何忍出此言，此言伤老客。

33.

Laŭdir' pliigas mian triston,

kvankam ĝi ja ne estas vera.

Hieraŭ mi ĵus sereniĝis

nun trist' min igas malespera.

Ĝi daŭras kun temp-pas' senfine,

sed en novjar' pli malmodera.

kiu ja scias, ke mi spertis

jam triston jen kun kor' mizera?

闻道愁难遣，斯言谓不真。昨朝曾趁却，今日又缠身。
月尽愁难尽，年新愁更新。谁知席帽下，元是昔愁人。

34.

Jen sur bovĉaro du testudoj

subite dramas sur la strato.

Salutas skorpio deflanke

kun peto por rajd-rajto.

Rifuz' kondukas al rankoro,

permes' al implikita stato.

Tuj oni povas ne decidi,

bonulo suferus pik-faton.

两龟乘犊车， 蓦出路头戏。 一盞从傍来， 苦死欲求寄。

不载爽人情， 始载被沈累。 弹指不可论， 行恩却遭刺。

35.

Silkraŭpoj junaj marte etas,

knabinoj plukas sovaĝflorojn,

ĉe muro ĉasas papiliojn,

ĉe lag' al ranoj ŝtonojn ĵetas,

enŝovas prunojn en manikojn,

kolekti bambuŝosojn pretas.

Ĉi tiu pejzaĝo alloge

ol mia loko pli koketas.

三月蚕犹小， 女人来采花。 隈墙弄蝴蝶， 临水掷虾蟆。

罗袖盛梅子， 金鑿挑笋芽。 斗论多物色， 此地胜余家。

36.

Riĉiĝis antaŭ kelkaj jaroj

oest-loĝanta oldulin'.

Malriĉa pli ol mi antaŭe,

ŝi pri monmank' nun mokas min.

Unue mi ŝin pikis vorte

kaj poste ŝi min sen intim'.

Mokado tia jen alternas

oeste al uest' sen fin'.

东家一老婆，富来三五年。昔日贫于我，今笑我无钱。

渠笑我在后，我笑渠在前。相笑倦不止，东边复西边。

37.

Riĉula fil' mastrumas fuŝe,

ĉe aferoj ne agas bone.

Da riz' putranta en tenejo,

buŝelon li ne pruntas done.

Li ĉiam kovas mav-intencon,

kalkulas por si laŭbezone.

Je l' tag' de lia mort' fenebros

nur zumaj muŝoj trista-tone.

富儿多鞅掌，触事难祇承。仓米已赫赤，不贷人斗升。
转怀钩距意，买绢先拣绫。若至临终日，吊客有苍蝇。

38.

Mi iam vidis unu talentulon
unike spritan kun erudici'.
Famiĝis li pro ekzamena laŭro
kaj pro verkad-lertec' en poezi'.
Ol antaŭuloj regas li pli bone,
superas lin ne jun-generaci'.
Li ekdibočas fole post riĉiĝo,
lia fam' degelas kiel glaci'.

余曾昔睹聪明士，博达英灵无比伦。一选嘉名喧宇宙，
五言诗句越诸人。为官治化超先辈，直为无能继后尘。
忽然富贵贪财色，瓦解冰消不可陈。

39.

Blank-gruo kun persik' enbuŝe,
ripozas post flugad' mil-lia*.

Li celas jen al Monto Penglai**,

kun persika nutraĵo tia.

Survoje plumoj falas de li,

lin frapas izoleco plia.

Revenas li al sia nesto,

malkonas lin edzino lia.

**li*: ĉina mezurunuo, egalas je duono de kilometro.

******Monto Penglai situas en Fujian-provinco de Ĉinio, alta je 1288 metroj.

白鹤衔苦桃，千里作一息。欲往蓬莱山，将此充粮食。

未达毛摧落，离群心惨恻。却归旧来巢，妻子不相识。

40.

Mi emas loĝi sinkaŝante.

al Guoqing-templon mi vizite

renkontas kaj zeniston Fenggan*

kaj bonzon Shide** neinvite.

Revenas al Frost-Mont' mi sola,

mi ĝuas vivon jen ermite.

Senfontan fluon mi priserĉas,

sekiĝus font', sed flu' ne spite.

*zenisto en Guoqing-templo

**bonzo en Guoqing-templo

惯居幽隐处，乍向国清中。时访丰干道，仍来看拾公。
独回上寒岩，无人话合同。寻究无源水，源穷水不穷。

41.

En viv' antaŭa mi stultegis,
min frapas senluminiĝo.

Mi vivas povre pro misfaro
en mia inta traviviĝo.

Se mi ne farus rebonigon,
en onto restus malfeliĉo.

Ne pram' troviĝas inter bordoj,
nu, kiel eblas transpasiĝo?

生前大愚痴，不为今日悟。今日如许贫，总是前生作。
今生又不修，来生还如故。两岸各无船，渺渺难济渡。

42.

Bela fraŭlin' de famili' Yu
kun nom' persona *Senĉagreno*
sur lotuslago ŝatas remi,
kaj ĉevalrajdi tra ĝardeno.

Ŝi sidas sur ursfelo verda,
surhavas palton kun plumpleno.
Ho ve, ĝis malpli ol cent jaroj
certe ŝi polviĝos en sveno.

璨璨卢家女，旧来名莫愁。贪乘摘花马，乐撈采莲舟。
膝坐绿熊席，身披青凤裘。哀伤百年内，不免归山丘。

43.

Edzin' de sinjor' Zhou el Diyan
kaj sinjorin' Du de Handan*
samaĝas ambaŭ proksimume
kun belaj vangoj ja en san'.
Hieraŭ pro maldecaj vestoj
suferis ili de rikan'.

Atendis por vestantoj aĉaj
en la festen' nur kruda pan'.

*Zhou kaj Du estas ĉinaj familiaj nomoj, kaj Diyan kaj Handan ĉinaj loknomoj.

低眼邹公妻，邯郸杜生母。二人同老少，一种好面首。
昨日会客场，恶衣排在后。只为著破裙，吃他残[蓏麦][麦娄]。

44.

Mi kuŝas malsupre de roko
jen en daŭrema nub-fluktuo.
Ekstere de la varma ĉambro,
mi foras eĉ de homa bruo.
En sonĝ' mi vagas en palaco,
sobre paŝas ponten kun ĝuo.
Forigas mi foliojn de mi
sob falajn el arboj kun skuo.

独卧重岩下，蒸云昼不消。室中虽踟蹰，心里绝喧嚣。
梦去游金阙，魂归度石桥。抛除闹我者，历历树间瓢。

45.

Objektoj ĉiuj ja utilas,
sed oni uzu ilin dece.
Se ili ne uzitas bone,
agadas oni malsukcese.
Per ronda guĝo fari kubon
pruviĝas vana pli ekscese.
Museton kapti per stalono
ol per lam-kato malpli jese.

夫物有所用，用之各有宜。用之若失所，一缺复一亏。
圆凿而方柄，悲哉空尔为。骅骝将捕鼠，不及跛猫儿。

46.

Eterne kiu povas vivi?

por ĉiuj morto estas sama.

Fortulo alta post nelonge

fariĝos polv' pro mort' spontana.

Transmond' ne konas tempopason,

herboj strebas al tag' sunbana.

La tempo ĉagreniga venas

eĉ vento igas trist-fontana.

谁家长不死，死事旧来均。始忆八尺汉，俄成一聚尘。
黄泉无晓日，青草有时春。行到伤心处，松风愁杀人。

47.

Ĉevalon galopigas vipo

voje al Lŭoyang-urb'* fiere.

Memfide bela la junulo

ne kredas je oldeco vere.

Hararo griziĝos spontane

saneco daŭros ne libere.

En tomboj jen sur Monto Bejmang**

ne kuŝas senmortuloj ere.

*Lŭoyang estas urbo en Henan-provinco de Ĉinio.

**Monto Bejmang situas norde de urbo Lŭoyang.

骝马珊瑚鞭，驱驰洛阳道。自矜美少年，不信有衰老。

白发会应生，红颜岂长保。但看北邙山，个是蓬莱岛。

48.

Kvazaŭ ebrie oni vivas

dum tempo akve fluas for.

Ĝis sub herbaĉoj oni kuŝas,

jam lumas maten-sun' sen glor'.

Putriĝas iliaj karn-ostoj,

spiritoj velkos sen valor'.

Kial ne ekiluminiĝi

por legi sutrojn kun fervor'?

竟日常如醉，流年不暂停。埋著蓬蒿下，晓月何冥冥。

骨肉消散尽，魂魄几凋零。遮莫咬铁口，无因读老经。

49.

Mi fikse loĝas sur Frost-Monto

dum tridek jaroj ja sintrene.

Hieraŭ l' karajn mi vizitis,

plejparte ili mortis svene.

La viv' kandlele forfandiĝas,

forfluas akve senrevene.

Solecan ombron rigardante,

mi larmas flue neretene.

一向寒山坐，淹留三十年。昨来访亲友，太半入黄泉。
渐减如残烛，长流似逝川。今朝对孤影，不觉泪双悬。

50.

Ni pare plukas lotusflorojn

sur lago okulplaĉe klara.

Ni ĝoje ludas ĝis krepusko,

fojfoje blovas vent' barbara.

Ambirdojn ondoj lulas skue,

anasojn puŝas akv' ŝaŭmfara.

Ni sidas en boat' kviete,

kun korinklino senkompara.

相唤采芙蓉，可怜清江里。游戏不觉暮，屡见狂风起。

浪捧鸳鸯儿，波摇鸂鶒子。此时居舟楫，浩荡情无已。

51.

Similas al aŭtuna luno

klarpura mia mens' sur lago.

Nenio sin komparas kun ĝi,

ne plie diru mi kun blago.

吾心似秋月，碧潭清皎洁。无物堪比伦，教我如何说。

52.

Salikoj malhelas nebule,

florkvast' ilia flirtas vate.

La edzo distas de l'edzino,

en hejm' ŝi mornas sopir-state.

En du malsamaj lokoj ili

intervidiĝos kiudate?

Averton al Lunvida Turo:

ne ligu hirundparon svate.

垂柳暗如烟，飞花飘似霰。夫居离妇州，妇住思夫县。

各在天一涯，何时得相见。寄语明月楼，莫贮双飞燕。

53.

Ni ĝuu kune vindrinkadon,
dividu ankaŭ viandmanĝon.

Ni ĉiuj kiel mortemuloj

klopodi devu je junaĝo.

Vestaĵo luksa belas dume,

portempas ora ornamaĵo.

Oldulo Zhang kaj avino Zheng*

forpasis jame sen mesaĝo.

*Zhang (Ĝjang) kaj Zheng (Ĝjeng) estas ĉinaj familiaj nomoj.

有酒相招饮，有肉相呼吃。黄泉前后人，少壮须努力。

玉带暂时华，金钗非久饰。张翁与郑婆，一去无消息。

54.

Junulo admirinda estas

jen kun fortika korp' muskola.

Je aĝ' de malpli tridek jaroj,

cent povojn li jam havas sola.

Li rajdas lerte en bravuloj,

amikiĝas per manĝ' bonvola.

Nur unu mank' troviĝas ĉe li:

bonvirtojn frontas li ignora.

可怜好丈夫，身体极棱棱。春秋未三十，才艺百般能。
金羁逐侠客，玉馔集良朋。唯有一般恶，不传无尽灯。

55.

Se persikflor' someron daŭrus,

ĝin jam detruus tempa provo.

Se serĉi Han-dinasti-anon*,

sukcesas oni nun sen povo.

Jen floroj velkas kaj disfloras,

naskas, mortas homoj en movo.

Ĉi tie estis mar' antaŭe

sed nun la ter' kun flirta polvo.

*Han-dinastio (206 a. K.-226)

桃花欲经夏，风月催不待。访觅汉时人，能无一个在。
朝朝花迁落，岁岁人移改。今日扬尘处，昔时为大海。

56.

Knabin' najbara en eosto

aĝas dek ok jarojn kun ĉarmo.

Lokanoj el oest' svatiĝas

por ŝin akiri por vivvarmo.

Ĉe nupto oni buĉas ŝafojn
diboĉas fole en homsvarmo.

Tiama ĝojo kun rid-bruo
ploradon kaŭzos jen pro karmo.

我见东家女，年可有十八。西舍竞来问，愿姻夫妻活。
烹羊煮众命，聚头作淫杀。含笑乐呵呵，啼哭受殃劫。

57.

Ĉe ĥatoj staras morusboskoj,
videblas bovoj jen en multo.

Efikas certe kaŭz-efekto,
pli malpli fruas la rezulto.

Riĉaĵoj konsumiĝos fine,
ekvivos ili en tumulto.

Surhavos ili paper-vestojn,
malsatos jen ĝis mort-sepulto.

田舍多桑园，牛犊满厩辙。肯信有因果，顽皮早晚裂。
眼看消磨尽，当头各自活。纸袴瓦作裤，到头冻饿杀。

58.

Pli ol cent hundojn mi jam vidis

kun hirt-haroj turpajn terure.

Trankvile iuj kuŝis tere,

aliaj promenis plezure.

Se oni ĵetas ostopecon,

por ĝi ili luktas konkure.

Malmultas ostoj, multas hundoj,

luktadon tio kaŭzas nure.

我见百十狗，个个毛狰狞。卧者渠自卧，行者渠自行。
投之一块骨，相与啮喋争。良由为骨少，狗多分不平。

59.

Mi fiksrigardas al ĉielo

blank-nuboj vapore nebulas.

Anasoj, kokoj sataj pigras,

feniksoj de malsato brulas.

Stalono sur Gobi' paŝtiĝas,

azenaĉo korte plezuras.

Ne konas oni ĉiel-alton,

marbirdojn flirtajn ondoj lulas.

极目兮长望，白云四茫茫。鸱鸦饱腹脍，鸾凤饥彷徨。
骏马放石磧，蹇驴能至堂。天高不可问，鷓鴣在沧浪。

60.

En Lŭoyang multas belulinoj,
printempe ĉarmas pli en glor'.

Ĉevoje ili plukas florojn
en harojn ŝovas por dekor'.

Ornamo flora troe pimpas,
rigardas oni sen ador'.

Ne vane veku vantano laŭdon,
ĝojigu l' edzono sen ignor'.

洛阳多女儿，春日逞华丽。共折路边花，各持插高髻。
髻高花匝匝，人见皆睥睨。别求醪醪怜，将归见夫婿。

61.

Printempe per ĉarmo paradas
sur vojoj fraŭlinoj en aro.

Krepuskon timas florspektantoj,

de blov' sin kaŝas hom' post arbo.

Junulo venas sur ĉevalo

kun sel' lakita per or-farbo.

Ne flirtu kun ni inoj longe,

konos l' edzoj tion per flaro.

春女衒容仪，相将南陌陲。看花愁日晚，隐树怕风吹。

年少从傍来，白马黄金羈。何须久相弄，几家夫婿知。

62.

Ĉe sunsubir' fraŭlinoj ludas,

parfumon sendas la ventfluo.

Iliaj jupej ore brilas,

harpingloj glimas per jad-bluo.

Sin vestas servknabinoj silke,

eŭnukoj estas en purpuro.

Erarvaginte pro spektado,

grizul' panikas kun kor-skuo.

群女戏夕阳，风来满路香。缀裙金蛱蝶，插髻玉鸳鸯。

角婢红罗缜，阉奴紫锦裳。为观失道者，鬓白心惶惶。

63.

Se oni fantomon renkontus,
paniku ne en via menso.

Ne donu atenteton al ĝi,
vokite ĝi vanuus de atenco.

Por tuja helpo petu Budhon
ja per bruligo de incensoj.

Ĝi kvazaŭ kul' sur fera bovo
ne povus piki laŭ intenco.

若人逢鬼魅，第一莫惊惶。捺硬莫采渠，呼名自当去。
烧香请佛力，礼拜求僧助。蚊子叮铁牛，无渠下嘴处。

64.

Torrente fluas Flav-Rivero
oesten longe jen senĉese.

Malklaras ĝia akv' neŝanĝe
trans homa vivodaŭr' ekscese.

Mi volas rajdi per blank-nubo,
kvazaŭ per flugiloj progrese.

Junuloj de post plenkreskiĝo

klopodi devas ja necese.

浩浩黄河水，东流长不息。悠悠不见清，人人寿有极。
苟欲乘白云，曷由生羽翼。唯当鬓发时，行住须努力。

65.

En boataĉ' kolektas lemnojn

laŭborde ni per pluka faro.

Pli ol ĉi tie ondoj ŝaŭmas,

sur malkvieta vasta maro.

Nur kun manĝaĵo unutaga,

kial vojaĝi sen preparo?

De kie naskiĝas ĉagreno?

Ĝi ja rezultas el amaro.

乘兹朽木船，采彼纒婆子。行至大海中，波涛复不止。
唯赍一宿粮，去岸三千里。烦恼从何生，愁哉缘苦起。

66.

Silenta mi min tenas longe,

junuloj ne plu klaĉas nun.

Ĉar mi surmonte vivas sole,

ne brilas la saĝeca lum'.

La magra korpo sen defendo

suferas pro vetera pun'.

Per kota bovo plugi kampojn

rikoltos nulon en aŭtun'.

默默永无言，后生何所述。隐居在林藪，智日何由出。

枯槁非坚卫，风霜成夭疾。土牛耕石田，未有得稻日。

67.

Tre estas fride en montaro,

de antikveco, sed ne nur nun.

Tutjare neĝo kovras montojn

arbarojn volvas nebulfum'.

Herbaro post Grenpluvo* ĝermas,

folifalas antaŭ l' aŭtun'.

Erarvagant' ĉi tie vane

ĉielon serĉas kun sunlum'.

*Grenpluvo: unu el la 24 sunperiodoj, kiu komenciĝas je la 19-a, 20-a aŭ 21-a de aprilo.

山中何太冷，自古非今年。沓嶂恒凝雪，幽林每吐烟。

草生芒种后，叶落立秋前。此有沈迷客，窺窺不见天。

68.

Ermite mi ĉagrenas ofte,
lamente pri temp-pasa flu'.
Mi pene studas sanktajn sultrojn
por senmortul' fariĝi, ĉu?
Nuberoj flosas sur ĉielo,
plenluno brilas jen sen bru'.
Do, kial ne reveni hejmen?
Ja pro osmant-aromo, nu.

山客心悄悄，常嗟岁序迁。辛勤采芝朮，搜斥讵成仙。
庭廓云初卷，林明月正圆。不归何所为，桂树相留连。

69.

Ĉe montpasejo homo sidas
kun fon' de ĉiela lazuro.
Li volas sendi bel-pejzaĝon
per longa peniga veturo.
Li plenas je ĉagren' kaj ĝeno
pro malsukces' ĝis l' old-obskuro.
Spite al oniaj ridmokoj,

li staras kun fidel-naturo.

有人兮山楹，云卷兮霞纓。秉芳兮欲寄，路漫漫难征。
心惆怅狐疑，年老已无成。众喔咿斯蹇，独立兮忠贞。

70.

Hom-karnon mortan manĝas porko,
mort-porkajn tripojn homo voras..

Ne hatas porko homfetonon,
kaj porkaĝ-guston hom' adoras.
Enakven ĵetu mortajn porkojn,
kotkovron hom' mortinta volas.
Se unu manĝas ne l'alian,
jen ili kiel budho soras.

猪吃死人肉，人吃死猪肠。猪不嫌人臭，人反道猪香。
猪死抛水内，人死掘土藏。彼此莫相啖，莲花生沸汤。

71.

Mi ĝojus kun ĥaosa menso,
sen manĝi, feki, eĉ sen scio.
Kiu min skulptis per ĉizilo,

min garnis per naŭ sens-funkcioj?

Mi ĉiam pri manĝaĵ' kaj vestoj,

pri rentoj dronas en ansio.

Mil homoj strebas por moneroj,

penante kun mortspita krio.

快哉混沌身，不饭复不尿。遭得谁钻凿，因兹立九窍。

朝朝为衣食，岁岁愁租调。千个争一钱，聚头亡命叫。

72.

Pro kio vi dolore ploras?

Larmperloj falas jen torente.

Ĉu okazas disiĝ' de l' karaj

aŭ katastrofo dummomente?

El malriĉec' rezultas ĉio,

efikas karmo evidente

Mi ofte inspektas kadavrojn,

do ne metempsikozos tente.

啼哭缘何事，泪如珠子颗。应当有别离，复是遭丧祸。

所为在贫穷，未能了因果。冢间瞻死尸，六道不干我。

73.

Pro pigro inoj ne plu teksas
nek viroj plugas kampojn vole.
Senĝene ili emas ludi
aŭ plukas liron tute fole.
Bezonas vestojn frostaj ostoj,
manĝaĵ' por ventroj urĝas bole.
Nun, kiu vin konsolas kare?
Nur ploras al ĉiel' vi sole.

妇女慵经织，男夫懒耨田。轻浮耽挟弹，跼躄拈抹弦。
冻骨衣应急，充肠食在先。今谁念于汝，苦痛哭苍天。

74.

Ne sekvas li Budhiĝan vojon,
sed agas kun malvirtoj pale.
Li poke dankas al Budao,
li plenas je envio male.
Li ŝtele manĝas la porkaĵon,
al Budho preĝas ja en-hale.
Praktiko tia de budhismo

kondukas al Infero fale.

不行真正道，随邪号行婆。口惭神佛少，心怀嫉妒多。
背后噬鱼肉，人前念佛陀。如此修身处，难应避奈何。

75.

Ekzistas speco de stultuloj,

simile vere al azeno.

Paroli home ili povas,

sed porke avidas sen ĝeno.

En tia lud' danĝera ili

pri ver' ne havas la komprenon.

Admon' al tiuj ĉirkaŭ ili:

al li ne taŭgas alkateno.

世有一等愚，茫茫恰似驴。还解人言语，贪淫状若猪。
险巇难可测，实语却成虚。谁能共伊语，令教莫此居。

76.

Kun nom' *Fiero* l' viro ĉiam

avidemas sub diboĉa pelo.

Li scias tute nulon pri si,

sed hatas ĉion kun ribelo.

Li malŝatas amaran kopidon,

inklinas tamen al mielo.

Soifas je fiŝaj' li ĉiam,

viand' lin logas sen ŝancelo.

有汉姓傲慢，名贪字不廉。一身无所解，百事被他嫌。

死恶黄连苦，生怜白蜜甜。吃鱼犹未止，食肉更无厌。

77.

Rinocerkornon eĉ vi havas,

okulojn tigrajn kun vidklaro,

persikajn branĉojn kontraŭ mavo,

l' amuleton super sortfalo,

kornusan vinon por varmigo,

lician supon por sanstaro,

vi iros do al mort' finfine

malgraŭ la vivlongiga faro.

纵你居犀角，饶君带虎睛。桃枝将辟秽，蒜壳取为瓔。

暖腹茱萸酒，空心枸杞羹。终归不免死，浪自觅长生。

78.

Loĝejo mia elektita

Malpli bonas ol palaco.

Simioj blekas en montvalo,
sterniĝas herboj sur kort-spaco.

Pinpingloj tiklas min en lito,
mi ĝuas akvon el font-graco.

Mi kontentiĝas pri la sorto,
pasigos viv-reston en paco.

卜择幽居地，天台更莫言。猿啼谿雾冷，岳色草门连。
折叶覆松室，开池引涧泉。已甘休万事，采蕨度残年。

79.

Pliigas pliigant' esencon,

pliigo tiu esta vera.

Ŝanĝas ŝanĝant' eksteran formon,

tio estas ŝanĝad' sincera.

Kiu pliigas kaj pli ŝanĝas,

feiĝos en la mond' etera.

Kiu ne ŝanĝas nek pliigas,

suferos parcon senespera.

益者益其精，可名为有益。易者易其形，是名之有易。
能益复能易，当得上仙籍。无益复无易，终不免死厄。

80.

Legad' de l' Tri Histori-libroj

kaj la Kvin Klasikaĵoj vanas.

Ĝis maljunaĝo mi ankoraŭ

en merit-atingado nanas.

Laŭ aŭgurado mavaj steloj

sortaĉon mian akompanas.

Pli bonas eĉ ol mi la arbo,

kiu jare verde spontanas.

徒劳说三史，浪自看五经。泊老检黄籍，依前住白丁。
筮遭连蹇卦，生主虚危星。不及河边树，年年一度青。

81.

En intermont' fontakvo puras,

luno blankas super Frost-Monto.

Kontempl' rivelas al mi klare

malplenon en la homa mondo.

碧涧泉水清，寒山月华白。默知神自明，观空境逾寂。

82.

Mi nune havas longan robon
el nek silkaĵo nek sateno,
kun fon-koloro nek la ruĝa
nek la purpura en soleno.
Somere kiel vest' kaj vintre
ĝi servas kiel litaj-pleno.
Uzitas laŭsezono ŝanĝe
ĉi tiu sola rob' sen ĝeno.

我今有一襦，非罗复非绮。借问作何色，不红亦不紫。
夏天将作衫，冬天将作被。冬夏递互用，长年只这是。

83.

Polv-balail' el vost-haregoj
kun aroma santal-tenilo
svingiĝas kiel nebul-gazo
kaj nuboj flosaj en facilo.

Somere helpas ĝi en rito,
balaas ankaŭ polvo-milon.
Ĉefbonzo uzas ĝin en templo
ĝustigi homojn per konsilo.

白拂梅檀柄，馨香竟日闻。柔和如卷雾，摇拽似行云。
礼奉宜当暑，高提复去尘。时时方丈内，将用指迷人。

84.

Al viv' diboĉa homoj avidemas,
sen sci' pri la kaŝita plag' en korpo.
Deziroj jen fikcias en miraĝo,
ŝanĝem' damaĝon donas al homsorto.
Posedi viroj devas ŝtalan volon
sen ajna mav-intenc' ĉe Budha pordo.
Konduti kiel kreskas bambuŝoso
vanigos ne la penojn de mensforto.

贪爱有人求快活，不知祸在百年身。但看阳焰浮沔水，
便觉无常败坏人。丈夫志气直如铁，无曲心中道自真。
行密节高霜下竹，方知不枉用心神。

85.

Ekzistas diversspecaj homoj

penantaj por renoma glor’,

ĉasantaj en kortegan rangon,

vendantaj por riĉaĵ-valor’.

Sen momenta halto ili

konkuras jen kun ŝvit-vapor’.

Finfine ili havas hejmon

kun servistoj por hejm-labor’.

Ĝis sepdek jaroj ili vivas

kiel glaci’ degelas for.

Post morto nul’ fariĝos ĉio,

do kiuj pretos je l’ honor’?

Komprenos klare ili tiam:

solviĝas kotoj en akv-vor’.

多少般数人，百计求名利。心贪觅荣华，经营图富贵。

心未片时歇，奔突如烟气。家眷实团圆，一呼百诺至。

不过七十年，冰消瓦解置。死了万事休，谁人承后嗣。

水浸泥弹丸，方知无意智。

86.

Riĉaĵojn penas teni homoj,
ja kiel idojn flegas strigo.
Formanĝas panjon l' id' plenkreska,
vundas troa riĉaĵ' per piko.
Disdon' de mono feliĉigas,
damaĝon kaŭzas monstapligo.
Monmanko paras kun sekuro
jen kvazaŭ bird' en flug-navigo.

贪人好聚财，恰如泉爱子。子大而食母，财多还害己。
散之即福生，聚之即祸起。无财亦无祸，鼓翼青云里。

87.

Mil liojn fore vi per glavo
jen kontraŭ hunoj vi batalas.
Vi venkas, ili ja pereas,
ili venkas, vi morte falas.
Domaĝas vi ne lian vivon
do kial vian vi ne ŝparas?
Konsilo por ĉiama venko:
vi ne vin avidema faras.

去家一万里，提剑击匈奴。得利渠即死，失利汝即殂。
渠命既不惜，汝命亦何辜。教汝百胜术，不贪为上谋。

88.

Kolero estas fajr' en koro,
pro ĝi seniĝas virtoj bonaj.
Sur vojo la bodia regu
koleron per faroj sindonaj.

瞋是心中火，能烧功德林。欲行菩萨道，忍辱护真心。

89.

Ve, kial vi insistas pri nescio?
Ĝi tiras vin al nigra demon-kavo.
Admonis mi vin praktiki bodion,
obstino via tenas vin al mavo.
Ne sekvas vi konsilon oran mian,
disvolvas vi malvirtojn jen de favo.
Ĝis kiam via kapo fortranĉiĝos,
komprenos tion vi malsaĝa sklavo.

汝为埋头痴兀兀，爱向无明罗刹窟。再三劝你早修行，

是你顽痴心恍惚。不肯信受寒山语，转转倍加业汨汨。
直待斩首作两段，方知自身奴贼物。

90.

Malvirtoj ŝajnas la vualo
baranta l' taglumon obscure.
Ok cent jaroj de l' homa mondo
forfulmas duonnokton nure.
Nekonvertebla homamaso
plorinda estas laŭnature.
Mi vin admonas elturniĝi
kaj genukulti Budhon ĵure.

恶趣甚茫茫，冥冥无日光。人间八百岁，未抵半宵长。
此等诸痴子，论情甚可伤。劝君求出离，认取法中王。

91.

Komprenemuloj en la mondo
sen konvertiĝo vane penas.
Ne emas ili bonfaradi,
sed nur malbonan karmon trenas.
Nur al kvin pekoj, dek malvirtoj,

venenoj tri* ili bonvenas.

Se ili falos en inferon,

silento morta ilin ĉenas.

*Kvin pekaj, dek malvirtoj kaj tri venenoj aludas al diversaj tabuoj laŭ budhismo.

世有多解人，愚痴徒苦辛。不求当来善，唯知造恶因。

五逆十恶辈，三毒以为亲。一死入地狱，长如镇库银。

92.

Senlime la ĉielo altas,

profundas treege la tero.

Interne bestoj vivas kune,

pro ĉiel-tera kre-genero.

Por viv' kap-riske ili luktas,

kaprice voras kun severo.

Ne kaŭz-efikon ili konas

ja kvazaŭ beb' ne pri lakt-vero.

天高高不穷，地厚厚无极。动物在其中，凭兹造化力。

争头觅饱暖，作计相啖食。因果都未详，盲儿问乳色。

93.

Finfine kiom da hom-specoj?

Malsamas ili laŭ figuro.

Avin' Ĝja aspektas virece,
dum senedzinas Hŭang oldulo.

La filo de Vej ja amindas,
filin' Ĝong hidas kun teruro.

Se iras ŝi al okcidento,

ŝin mi evitas per forkuro.

*Ĝja, Hŭang, Vej kaj Ĝong estas ĉinaj familinomoj.

天下几种人，论时色数有。贾婆如许夫，黄老元无妇。
卫氏儿可怜，钟家女极丑。渠若向西行，我便东边走。

94.

Ne avidemas bonvirtuloj,
stultuloj nure ŝatas oron,
alies kampojn alproprigas
kaj bambuejojn per rab-voro.

Konkuras ili por riĉaĵo
ĉevalojn pelas sen favoro.

Rigardu tombojn sur montetoj
Kaj inter pinoj en vent-ĥoro.

贤士不贪婪，痴人好炉冶。麦地占他家，竹园皆我者。

努膊觅钱财，切齿驱奴马。须看郭门外，垒垒松柏下。

95.

Bazare fiŝo aĉetitas

kiel manĝaĵo por l' edzino.

Do, kial ĝin mortigi buĉe

por vin amuzi kun inklino?

Tio ne igas vin ĉielen,

sed ja inferen laŭ destino.

Laŭdira argument' pri vivo

kaduke staras sur ruino.

啧啧买鱼肉，担归喂妻子。何须杀他命，将来活汝己。

此非天堂缘，纯是地狱滓。徐六语破堆，始知没道理。

96.

Ailantarbon iuj nomas

la blank-santal' kun arom-bano.

Bodi-lernantoj miriadas,

sed pokaj venas al nirvano.

Por herboj ili ĵetas oron

kaj fine kun malplena mano.

Eĉ sabloj amasiĝas, ilin
buligi troviĝas en vano.

有人把椿树，唤作白梅檀。学道多沙数，几个得泥丸。
弃金却担草，谩他亦自谩。似聚砂一处，成团也大难。

97.

Prepari manĝon per sableroj,
putfosi ĉe soifa horo,
platfroti brikon en spegulon,
estas tute vana laboro.

Laŭ Budho estaĵoj egalas
kun vera denaska valoro.

Ni ekzameni nin skrupule,
konkuru ne por vanta gloro.

蒸砂拟作饭，临渴始掘井。用力磨碌砖，那堪将作镜。
佛说元平等，总有真如性。但自审思量，不用闲争竞。

98.

Aferojn ekzameni devas
oni por detalojn akiri.

Ne volu agi senpripense
por alies bonon deŝiri.
Flatad' aferon malbonigas,
veron igas klaĉad' foriri.
Salive babilaĉas homoj,
turnu vian dorson al ili.
Mezuri vin mem ja diskrete
Ne aŭskultu ilin deliri.

推寻世间事，子细总皆知。凡事莫容易，尽爱讨便宜。
护即弊成好，毁即是成非。故知杂滥口，背面总由伊。
冷暖我自量，不信奴唇皮。

99.

Pedantoj deprimitaj vivas
en ambaŭ frido kaj malsato.
Poemojn en liberaj horoj
ili verkas pene kun ŝato.
Iliaj verkoj trafas strabon,
ili veas en trista stato.
Se skribiĝus tiuj sur kukoj,
ne venus hundoj kun flarado.

蹭蹬诸贫士，饥寒成至极。闲居好作诗，札札用心力。
贱他言孰采，劝君休叹息。题安糊饼上，乞狗也不吃。

100.

Vivo kaj mort' alternas cikle,
ankaŭ glaci' kaj akv' tielas.

Glaci' el akvo solidiĝas,
en akvon la glaci' degelas.

Respondas mort' al onta vivo,
naskiĝo sekvan morton celas.

Glaci' kaj akvo ne konflikta,
vivo kaj morto pare belas.

欲识生死譬，且将冰水比。水结即成冰，冰消返成水。
已死必应生，出生还复死。冰水不相伤，生死还双美。

101.

Dum vigloplenaj junaj jaroj
mi ĉasis en arbar' per forto.

Allogis min nek ofic-rango,
nek viv' feeca de komforto.

Sur blanka stalion' fiere
mi lasis falkon por ĉas-sporto.
Subite mi perdiĝon sentis,
impone, sed sen laŭda vorto.

寻思少年日，游猎向平陵。国使职非愿，神仙未足称。
联翩骑白马，喝兔放苍鹰。不觉大流落，皤皤谁见矜。

102.

Ermite en arbaro densa
mi vivas kampule humile.
Mi ĉiam justa kaj honesta,
neniam flatas senkonsile.
Mi estas senmakula gemo,
atingis bodion facile.
Malkiel surondaj anasoĵ,
elstaras mi en ili brile.

偃息深林下，从生是农夫。立身既质直，出语无谄谀。
保我不鉴璧，信君方得珠。焉能同泛滟，极目波上鳧。

103.

Alies mankojn ne ataku,
nek vin beligu per laŭd-dono.

Laŭ via povo faru penojn,
retiru vin sen fort-dispono.

Ĉagren' kun rangaltiĝo kreskas,
parol' varias laŭ persono.

Admonon tenu en memoro
rikoltos multon vi de bono.

不須攻人惡，何用伐己善。行之則可行，卷之則可卷。
祿厚忧積大，言深慮交淺。聞茲若念茲，小子當自見。

104.

Ĉe patra naskiĝfestoj
ariĝis por luksa festeno.

Jen malriĉulo' senhava volis
kaŝprunti lumon de sereno.

Li forpelitas neatende
al mallumejo en ĉagreno.

Je mia miro, ĉu riĉuloj
domaĝas lumon kun kompreno?

富儿会高堂，华灯何炜煌。此时无烛者，心愿处其傍。
不意遭排遣，还归暗处藏。益人明詎损，顿讶惜馀光。

105.

Saĝuloj en la lando legas
klasikajn librojn diligente.
Izolas ili sin de l' mondo
aspektas ŝajne eminente.
Super aliaj ili staras
distinge blufas plekontente,
sed la esencon libran ili
ne konas tute elemente.

世有聪明士，勤苦探幽文。三端自孤立，六艺越诸君。
神气卓然异，精彩超众群。不识个中意，逐境乱纷纷。

106.

Jen belas montoj kaj riveroj,
vualas verdon la nebulo.
Malsekan vent' koltukon ludas,
gutas sur herb-mantel' ros-rulo.
Kun vojaĝŝuoj kaj grimp-kano

mi vagas en dens-nuba lulo.

Eĉ la songlando ne pli ĉarmas

ol ĉi pejzaĝa ter-angulo.

层层山水秀，烟霞锁翠微。岚拂纱巾湿，露沾蓑草衣。

足蹶游方履，手执古藤枝。更观尘世外，梦境复何为。

107.

Mi legas versojn de genio

kaj rafinitan vinon prenas.

Bovidojn ŝatas mi observi,

kaj sidi ĉirkaŭ ili emas.

Sur la tegmento glimas rosoj,

fenestroj per lunlum' briltremas.

Trinkinte tasojn du da vino

jen kaj jen buŝe mi poemas.

满卷才子诗，溢壶圣人酒。行爱观牛犊，坐不离左右。

霜露入茅檐，月华明瓮牖。此时吸两瓯，吟诗五百首。

108.

Du filoj de familio Shi*

famiĝis jen per talentpleno
kaj lertis en batal' kaj klero.
Oficis ili por du regnoj.
Pri edukado Majstr' Meng ĉuis,
flegis Patro per granda peno.
Ne brilis ili en okupo,
sed malamikis sur tereno.
*Shi (Ŝi): ĉina familia nomo

施家有两儿，以艺干齐楚。文武各自备，托身为得所。
孟公问其术，我子亲教汝。秦卫两不成，失时成龃齟。

109.

Kunvivas paro da ambirdoj
nedisigeble momentete.
Komune manĝon ili havas,
kaj plumglatigas tualete,
dumtage sin amuzas ĝoje,
ĉeborde dormas jen kviete.
Memkontenteme ili vivas,
feniksan vivon spitas ĵete.

止宿鸳鸯鸟，一雄兼一雌。衔花相共食，刷羽每相随。

戏入云霄里，宿归沙岸湄。自怜生处乐，不夺凤凰池。

110.

Taŭismon praktikantaj iuj
talentas pli ol Konfuceo,
jen ŝajnas iam kalva homoj
kaj iam knaboj kun obeo.
Moviĝas ili ne per pelo
nek per minaco de pereo.
Kondutas ili tre timide
ja kiel buboj sen ideo.

或有衒行人，才艺过周孔。见罢头兀兀，看时身侗侗。
绳牵未肯行，锥刺犹不动。恰似羊公鹤，可怜生氎氎。

111.

Li lernis, plugis de juneco
loĝante ĉe pli aĝa frato.
Pro ties riproĉo severa
kaj pro edzina malŝato,
forlasis li laikan mondon
vojaĝis, legis en pac-stato.

Sed kiu povus savi l' fiŝon
baraktadantan sur ter-plato?

少小带经锄，本将兄共居。缘遭他辈责，剩被自妻疏。
抛绝红尘境，常游好阅书。谁能借斗水，活取辙中鱼。

112.

Ŝanĝiĝas la hom-mond' senfine,
la viv' kaj morto karuselas.
Estiĝas birdoj tra infero,
kaj fiŝoj el kvin montoj elas.
Mi estu ŝaf' en ĥaos-tempo,
ĉevalon en pacmond' mi celas.
Riĉul' is en antaŭa vivo
kiel povrul' nun ne ribelas.

变化计无穷，生死竟不止。三途鸟雀身，五岳龙鱼已。
世浊作[羊兒]羈，时清为騾耳。前回是富儿，今度成贫士。

113.

En imperiaj ekzamenoj,
ne gajnis rangon mi sukcese.

Ekzamenistoj tro ĉikanis,
kontrolis mankojn mi senĉese.

Koncernas tion la destino,
ĉi-jare provu mi necese.

Blindul' okulon birdan celas,
hazarde trafas eble jese.

书判全非弱，嫌身不得官。铨曹被拗折，洗垢觅疮瘢。
必也关天命，今冬更试看。盲儿射雀目，偶中亦非难。

114.

Azen' ankoraŭ tro malsatas
dum hundo grasas joviale,
en distribuo de manĝaĵo
se ili donatas egale.

Por kontentigi la azenon,
la hund' suferas mankon gale.

Kiel dividi? Mi kalkulas.

Ĉagrenas tio min fatale.

贫驴欠一尺，富狗剩三寸。若分贫不平，中半富与困。
始取驴饱足，却令狗饥顿。为汝熟思量，令我也愁闷。

115.

Sinjoro Lju* okdek-du-jara
kun dekok-jara la edzino
ĝojplene vivas harmonie
kun reciproka korinklino,
deziras naski filon tigran
aŭ filinon de ĉarm-fascino.

Lian' ŝi ŝajnas ĉirkaŭ edzo
sufokos morte lin ĝis fino.

*Lju: ĉina familia nomo

柳郎八十二，蓝嫂一十八。夫妻共百年，相怜情狡猾。
弄璋字乌虎，掷瓦名媼。屡见枯杨萎，常遭青女杀。

116.

Enmonde multaj mizeruloj
ol bestoj vivas pli malbone,
ĉe muelilo noktis ofte
kaj tage almozas plorsone.

Pri manĝoj ili nur kalkulas,
eĉ sen vestaĵoj vitr-sezone.

Nur sur pajl-fasko ili dormas

kaj manĝas branojn pridispone.

大有饥寒客，生将兽鱼殊。长存磨石下，时哭路边隅。
累日空思饭，经冬不识襦。唯斋一束草，并带五升麸。

117.

Kiel imponas la vin-vendejo

kun alkoholkaĵo bonodora.

Reklamas ĝi per flag' flirtanta,

sed venas ne klient' favora.

Ne negocad' sukcesas, kial?

hundoj gardas kun voĉo rora.

Forlasas knaboj anstataŭ aĉeti

je hunda bojado horora.

赫赫谁垆肆，其酒甚浓厚。可怜高幡帜，极目平升斗。
何意讶不售，其家多猛狗。童子欲来沽，狗咬便是走。

118.

En mond' ĥaosa kaj malvirta

sanktule agas eĉ rakŝaso.

Li blagas pri pureco sia

de Budho foras kun temppaso;

li blufas per tigra minaco,

kaj falsas oron per fatraso.

La kupraerc' en povas vere

fariĝi pura or-amaso.

*rakŝaso=demono en la hinda mitologio

吁嗟浊滥处，罗刹共贤人。谓是等流类，焉知道不亲。

狐假师子势，诈妄却称珍。铅矿入炉冶，方知金不知。

119.

Spite al vetervarm' kampuloj

ĝoje drinkas per vinpokalo.

Kun fruktoj dise elmetitaj

ĉirkaŭ vinkruĉo sub lunpalo

surmate ili sidas, manĝas

el palm-folia teleraro.

Al ili postebriaj l' mondo

fariĝas terbula egalo.

田家避暑月，斗酒共谁欢。杂杂排山果，疏疏围酒樽。

芦苇将代席，蕉叶且充盘。醉后支颐坐，须弥小弹丸。

120.

Malriĉa la klerul' frekventis

urbegon ja por ekzameno.

Je l' aĝ' de ĉirkaŭ tri dek jaroj

kelkfojis li en partopreno.

Sen ajna groŝo li nur havis

nur librojn enpake en pleno.

Ĉe manĝbutik' li eĉ ne haltis

sed sin forturnis kun ĉagreno.

个是何措大，时来省南院。年可三十馀，曾经四五选。
囊里无青蚨，筐中有黄绢。行到食店前，不敢暂回面。

121.

Dum ordinara vivo oni

bezonas kutimon de ŝparo.

Dumviva prodigado certe

kondukos fine al senfaro.

Ĉe entombigo sur la monto,

la viv' perdiĝos pro eraro.

Jam de nun fliku l' malbonvirton

ĉar daŭros ĝi ja kun amaro.

为人常吃用，爱意须慳惜。老去不自由，渐被他推吁。
送项荒山头，一生愿虚掷。亡羊罢补穿，失意终无极。

122.

Surgrimpi ĝisĉielan domon

vanege estas en aero.

La san-zorganto mortas juna

sufokas doktajn rang-kapero.

Ne sekvu junulajn konsilojn

nek plendu pri oldula kvero.

Kondu tu kiel sago rekta

sen bonintenca malsincero.

浪造凌霄阁，虚登百尺楼。养生仍夭命，诱读讷封侯。
不用从黄口，何须灰白头。未能端似箭，且莫曲如钩。

123.

La nuba mont' sub ĉiel-bluo

Soleca pado enarbare.

Plenluno brila alte fore,

ĉirpado birda jen najbare.

Ermite loĝas mi en monto,

kadukos fine ĝisgrizhare.

Forpasas vee int' kaj nuno,

vanuos ĉio sendeklare.

云山叠叠连天碧，路僻林深无客游。远望孤蟾明皎皎，近闻群鸟鸣啾啾。

老夫独坐栖青嶂，少室闲居任白头。可叹往年与今日，无心还似水东流。

124.

Parencoj al riĉulo svarmas

por ioma fam' aŭ profito.

Disiĝas de povrul' karuloj

kaj sangaj fratoj por evito.

Hastadas je elekto reĝa

plifruie oni sen hezito.

Sur stratoj oni vane trivas

sennombrajn ŝuojn pro vizito.

富贵疏亲聚，只为多钱米。贫贱骨肉离，非关少兄弟。

急须归去来，招贤阁未启。浪行朱雀街，踏破皮鞋底。

125.

Ekloĝis homoj en Frost-Monto

forpasis jam dum dek mil jaroj.

Ĉe rojoj kaj arbaro ili

vivadas distre sen komparo.

Senhomas sur la frosta roko

kovrita blanke de nubaro.

Herbaro servas kiel lito,

ĉielo kiel kovrilparo.

Kun ŝtono kiel kapkuseno,

mi dormas ĝoje tra tempmaro.

粤自居寒山，曾经几万载。任运遁林泉，栖迟观自在。

寒岩人不到，白云常叆叇。细草作卧褥，青天为被盖。

快活枕石头，天地任变改。

126.

Ĉe klifo sidas mi silente,

altsupre brilas luno ronda.

Mil formoj ombras en lunlumo,

sed lun' ne estas lumo fonta.

Spirit' senfuŝa estas klara,

misteras vaka kavo monta.

Rigard' al lun' laŭ fingromontro

kondukas al animo sonda.

岩前独静坐，圆月当天耀。万象影现中，一轮本无照。

廓然神自清，含虚洞玄妙。因指见其月，月是心枢要。

127.

Deziras al oesta klifo

mi iri jam de multaj jaroj.

Hieraŭ grimpis per rampaĵo

mi stagnis pro nebula baro.

Stretvoj' vestadon mian ĝenis,

sur musko glitis la ŝuparo.

Kuŝiĝis mi sub cinamarbo

mi endormiĝis en nubmaro.

欲向东岩去，于今无量年。昨来攀葛上，半路困风烟。

径窄衣难进，苔粘履不全。住兹丹桂下，且枕白云眠。